# Agadraporto 2021

## 1. ADMINISTRADO

### 1.1 Membraro

2021 : 85
2020 : 94
2019 : 156
2018 : 161
2017 : 120

### 1.2 Jarkunveno

La jarkunveno okazis sabaton la 20an de marto 2021 rete per Zoom. La agadan kaj financan raporton aprobis la membroj per reta kaj poŝta voĉdonadoj.
Jen la nova komitato :
- Michèle Abada-Simon (MAS)
- Pierre Gauthier (PG)
- Marc Giraud (MG)
- Didier Janot (DJ)
- Aurélien Lestage (AL)
- Didier Loison (DL)
- François Lo Jacomo (FLJ)
- Marielle Martin (MM)
- Laure Patas d'Illiers (LPI)
- Guillaume Vera-Navas (GVN)
- Frantz Vichot (FV)

Tuj post la jarkunsido, la komitato elektis novan estraron :
- Marc Giraud, prezidanto kaj reprezentanto ĉe Esperanto-Francio
- Laure Patas d'Illiers, sekretario
- Didier Loison, kasisto
- Pierre Gauthier, vic-kasisto

Ĉiuj mandatoj finiĝos dum la jarkunveno 2022

### 1.3 Komitataj kunvenoj
Inter la lasta jarkunsido kaj la venonta, la komitato kunsidis 5foje : 20/03, 04/06, 18/09, 03/12, 28/01

### 1.4 Rilatoj kun Esperanto Francio
Marc Giraud estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-Francio. Diversaj bonvolemuloj de nia federacio helpas ĉe la ĉerizejo pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Esperanto-Francio kaj partoprenas en la vivo de la landa asocio

### 1.5 Komunikado
La komunikado de la federacio unue disvolviĝas per la retejo esperanto.paris. Sekve kaj kaskade, la informoj estas publikigitaj en pluraj sociaj retoj. Por atingi pli rapidan kaj efikan rezulton ni starigis novan organizadon danke al respondeculoj pri diversaj taskoj :

esperanto.paris : DJ, AL
esperanto aktiv' : LPI, MG
Facebook : MG, DL
Dissendo-listoj : LPI, MG
Duolingo : LPI
Amikumu : PG
Twitter : PG
Telegramo : AL

## 2. AGADOJ

**2.1 Eventoj**
En 2021, la iom pliboniĝanta sanitara situacio ebligis al ni denove organizi kelkajn ĉeestajn eventojn :
- **Kulturaj vesperoj** : (LPI) Kulturaj vesperoj okazas ĉiumonate, la 1an merkredon, eble ankaŭ la 3an merkredon. En novembro, ni lanĉis novan projekton: mem krei filmeton. La filmeto estos humura. Ĝi uzeblos kiel parto de spektaklo dum festoj. Ĝi ankaŭ estos enretigebla. Kiel elirpunkton ni uzis malnovan sketĉon, verkitan de François Lo Jacomo por la teatra asocio TESPA kaj jam plurfoje surscenigitan. La sketĉo estis verkita por viva ludo sur sceno; necesis adapti ĝin por filmado. Dum la unua trimestro, per komuna laboro dum la kulturaj vesperoj, ni adaptis la tekston kaj kunkreis la scenaron de la filmeto. Dum la dua trimestro, ni provos dediĉi ĉiumonate la 3an merkredojn al la filmado, por ke la 1a merkredo estu libera por aliaj kulturaj agadoj. Ni komencis filmi la scenojn, kiuj okazas en la sidejo. Dum la printempo, ni intencas filmi la scenojn, kiuj okazas ekstere. Ĉiuj estas bonvenaj por partopreni la filmadon, kiel rolanto, helpanto, konsilanto, ktp.
- **Eo-kafejoj** : La Esperanto-kafejo okazas ĉiumonate la duan sabaton. Estas okazo por Esperantistoj por renkonti kaj babili pri ion ajn dum manĝante kaj trinkumante en bonetosaj lokoj. Komencantoj estas bonvenaj. En 2021, ĝi ne okazis de januaro ĝis junio pro sana krizo.

Chi sube, la listo de la eventoj kiuj ja okazis en 2021 :

| Dato | Loko | Nb de partoprenantoj |
|---|---|---|
| 21-07-10 | Pikniko en la arbaro de Bois de Vincennes | 10 |
| 21-09-11 | Social Bar<br>(25 rue Villiot 12e) | 15 |
| 21-10-09 | La Contrescape<br>(57 Rue Lacépède, 5e) | 8 |
| 21-11-13 | Dans la foulée<br>(111 Bd de Menilmontant 11e) | 11 |
| 21-12-11 | L'Arrosoir<br>(75 avenue Dausmenil 12e) | 11 |

- **Foiro pri matematikaj ludoj :** Kiel pasintjare, Animath organizis virtuale sian foiron pri matematikaj ludoj, de la 27a ĝis la 30a de majo, kaj denove nia francilia federacio partoprenis. Novan filmeton “ElémentERe, l’espéranto!” kreis tiucele François, Laure kaj Régis aldone al la pasintjara (l’espéranto, une langue presque mathématique), al tiu de Elisabeth (l’espéranto, un jeu d’enfant) kaj al pli longa esperantlingva (kun francaj subtekstoj) pri orientita geometrio, de François. Ĉiuj kvar daŭre videblas per Jutubo (spektitaj entute pli ol 400-foje). Ĉiutage de la 15a ĝis la 17a ni ĉeestis virtuale kun kvar malsamaj temoj: l’espéranto, porte de l’interculturalité ; l’espéranto, un exercice de logique ; l’espéranto et sa culture ; l’espéranto, aide à l’apprentissage ; sed kun nesufiĉa ekstera publiko. La anonco pri nia budo estis ne facile trovebla: ni esperu, ke venontjare la foiro okazos ĉeeste.
- **Homara festo** : per homaj laborfortoj ni kontribuis al la partoprenado de Esperanto-Francio en septembro 2021. Dum tri tagoj, 10-11-12a de septembro 2021, pluraj membroj de nia asocio (i.a. MAS, DL, GVN, MG, PG, AK, AL) venis al la Homara festo por deĵori ĉe la budo de Espéranto-France ene de la « Libra Vilaĝo ». Aldone al la disdonado de kalendaretoj kaj paĝmarkiloj, pluraj libroj estis venditaj tiuokaze. Tiu sperto naskis plurajn ideojn por plibonigi la venontajn ĉeestajn eventojn.
- **Debato pri la futuro de UEA** : sabaton la 22an de Januaro kun Francesco Maurelli (hibrida evento). Kun pli ol 20 partoprenantoj, ĉeeste kaj virtuale, Francesco Maurelli, el la financa komisiono de UEA, dum kelkhora restado en Parizo (inter du aviadiloj) debatis pri la estonteco de UEA. Venis demandoj pri la eventuala vendo de la Centra Oficejo, la biblioteko Hector Hodler, la financa situacio, la komitato, la delegita reto… La debaton gvidis Marc.

- Ni organizis aŭ partoprenis en multaj retaj eventoj kadre de la **ĝemelaj urboj Romo kaj Parizo**. De la komenco de nia kunlaboro okazis jam 18 babilrondoj (la 18a okazos en marto) kaj 3 legokluboj (la 3a okazos la 12an de februaro). De Marto 2021okazis 10 babilrondoj kaj unu leguklubo. De septembro 2021 Ni turneas tra la mondo kaj ĝis nun haltis en Tokio (2foje), Seulo, Pekino, Novojorko (2foje)

**2.2 Instruado**
De septembro 2021 nia federacio ofertas 5 kursojn
- ĉeesta por komencantoj de MAS (2 lernantoj)
- ĉeesta por altniveluloj de FLJ (6 lernantoj)
- ĉeesta kurso "Café croissants Espéranto" de GVN (varia nombro de lernantoj)
- reta kurso por komencintoj de MG (5 lernantoj)
- reta kurso por meznivelulo j de MG (4 lernantoj)